# Pola Esperantisto

## Esperantysta Polski

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO KAJ EKSTERLANDE
MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE I ZAGRANICĄ.

WYDAWCY: ELDONANTOJ: POLA ESPERANTISTA KLUBO & SOCIETO ESPERANTO EN KRAKÓW.

REDAKTORZY REDAKTANTOJ PROF. DR. ODO BUJWID — TAD. HODAKOWSKI

XXVII JARO. NR. 1 | Redakcio kaj Administracio KRAKÓW, LUBICZ 34. Abonprezoj ktp. vidu ĉe fino de l' tekstoparto. | JANUARO 1933.

# NIAJ PROGRESOJ DUM LA PASINTA JARO.

Kiel ĉiujare, ankaŭ hodiaŭ ni povas konstati, ke la afero de internacia lingvo progresas. Neniam ni atendis rapidan marŝon antaŭen. Homa naturo estas koservema en multaj direktoj. Speciale ĉi tie, kiam alproksimiĝas grava decido de la uzado de unu lingvo por ĉiuj. Generale oni ankoraŭ ne povas kompreni, ke iu arta lingvo povas anstataŭi la naturajn. Tiu komprenemo disvolviĝas paŝo post paŝo, kiam la nombro de esperanton jam studintaj personoj obliĝis kaj speciale, kiam diversaj fakuloj iĝis esperantistoj. Nun pli kaj pli favore pritraktas esperanton diversaj fakaj asocioj, kiuj fine komprenis ke nur arta, neniam natura nacia lingvo, povas iĝi internacia. Ni citos kelkajn lastajn sukcesojn.

En aprilo Berlinaj teknikaj rondoj atente aŭskultis la prelegon de Inĝ. E. Wüster pri diversaj lingvoj uzataj en la teknika scienco. Inter aliaj Dro W. pruvis, ke por bone paroli angle estas necese tiom da tempo kiom necesas por legi angle kaj bone paroli esperante. Estas ja konate, ke legado en ĉiu lingvo estas sufiĉe facila por diversaj fakuloj (ne por la literatura lingvokompreno), tamen estas malfacile bone paroli kaj gramatike senerare skribi. El tio sekvas, ke esperanto devas esti akceptita kiel komuna internacia lingvo, plej facile lernebla.

Kiam en Vieno oni demandis la aŭdantaroń pri la lingvodeziroj, 2000 personoj demandis esperanton. La cifero estas plej favora por E. Entute estis en la lasta jaro en 26 landoj 14 ,673 radioparoladoj.( Germ. Esperantisto januaro 1933).

Pariza Esp. Kongreso estis tre grava paŝo por la diskonigo de la lingvo E. Dum la Kongreso Pariza Komerca Ĉambro post la raporto de l' prezidanto André Baudet proponis E., kiel internacia lingvo de la komerco.

Komerca E. asocio Dresden Radebeul decidis proponi E. kiel komuna internacia lingvo de komerco kaj industrio. Pro tio estas necese havigi esperante parolantajn delegitojn en ĉiuj landoj.

Internacia Asocio de la teknikaj gazetoj, al kiu apartenas ĉ. 2000 gazetoj, proponas resumon en E.

Dum la V Intern. Kongreso de la seksologio en Brno kaj dum la Intern. Elektrokongreso en Parizo, ambaŭ en 1932 oni decidis E. kiel kongresa lingvo.

Amerika Asocio I. A. L. A. (Intern. Auxil. Language As.) konstatis, ke en Eŭropo ekzistas en 62 landoj 7021 e.—instruistoj: en 37 landoj ekzistas 1053 lernejoj kun E. instruado.

Estas notitaj nur plej gravaj antaŭenpaŝoj de la esperanto-movado dum lasta tempo.

En mia lando estas notinda fakto de pli favora sintenado de Pola Radio. Estonte ni havos duan merkredon de ĉiu monato je la 22 h 40 radioparoladon en esperanta lingvo pri diversaj okazintaĵoj en Polujo.

Dua grava fakto estas la eldono de la lernolibro por polaj blinduloj: pole esperante en Braille'a alfabeto. Redaktis E. Rytemberg. Eldonis Ŝtata Instituto por blinduloj kaj surdmutuloj en Warszawa. Presis Amerika sekcio de Braille Press.

Monon por la eldono kolektis krakovaj esperantistoj. **O. B.**

# V-a POLLANDA KONGRESO ESPERANTISTA EN LUBLIN.

### (DUA PARTO, FINO).

La reorganizo de la Esp. movado en Polujo estis ankaŭ vigle priparolata kune kun la raporto de P. E. D. pri ĝia agado.

Ne grandaj estis la raportoj, faritaj de prezidanto prof. Bujvid, ĝenerala sekretario Hodakowski kaj kasisto Alfus. Mankis en ili la ornamoj kaj memlaŭdoj pri imagitaj sukcesoj, troveblaj en raportoj de „spertuloj".

Certe estus multo pli farebla. Ne nur la eternaj serĉantoj de truoj, sed eĉ bonvolaj amikoj povus kritiki tiun aŭ alian mankon ĉe P. E. D. Tamen la plej bonan respondon je ĉio donis la seka malgrasa cifera raporto de la kasisto Alfus. Tial prave plendis Lejzerović, ke la Esp. grupoj en Polujo ne faras sian devon rilate al P. E. D.

El la raporto estu citita notinda sukceso ĉe Pola Radio. Kiel oni scias, la direkcio de Pola Radio kun mirinda obstino kontraŭstaris ĉiun provon enkonduki Esperantajn prelegojn. Nur unufoje dum la jaro okaze de Zamenhofa naskotago la tutmondo povis aŭskulti prelegon en nia lingvo el la naskolando de la Majstro. Post granda hezito la direkcio fine kun peza koro cedis al la persistaj proponoj de prof. Bujvid, permesante ankoraŭ kelkajn prelegojn Esperantlingvajn de prof. Bujvid kaj de s-ro Hodakowski pri kultura vivo de Polujo kaj pri turismaj vidindaĵoj de ĝi. La efiko de tiuj paroladoj estis eksterordinare granda. La ministerio de eksterlandaj aferoj agrable surpriziĝis pro la tre granda nombro da leteroj, alvenintaj de ĉiuj flankoj de la mondo. Oni konstatis kun miro kaj admiro, ke neniu prelego en ia ajn alia lingvo kaŭzis tioman resonon. Rezulte la direkcio laŭ instigo jam de regnaj faktoroj decidis enkonduki regulajn ĉiumonatajn disaŭdigojn Esperantajn. Unua paŝo do estas farita. Ĝin sekvu baldaŭ aliaj. Radia kurso de Esperanto pleje necesas!

La raportoj estis konfirmitaj, post kio nia brava Zawada prezentis sian planon pri plifirmigo de la Esperanta organizo en Polujo. Tiu reorganiza projekto ne celis reorganizon pro nura reorganizo, kiel tio okazas ofte en nia ĉiam verda kaj nur iam maturiĝonta mondeto. Ne, Zawada sincere volas, ke nenio bona ĝisnuna estu detruita, sed ke P. E. D. havu la plej bonajn kondiĉojn kaj eblecojn por plivastigi kaj plilarĝigi sian agadon kun la helpo de ĉiuj bonvoluloj kaj laboremuloj.

La bone prilaborita propono de Zawada kompreneble trovis konsenton de ĉiuj. Por efektivigi la intencatan pliintensiĝon de la PED-agado oni tuj elektis novan, pli vastan „plenan komitaton". Kompleta nomaro de ĝiaj membroj jam aperis en la novembra. No de „Pola Esperantisto".

Kiel prezidanto de la Ekzekutiva Komitato estis aklame elektita prof. dro Odo Bujvid. Ceteraj membroj de la Ekzekutiva Komitato estas rezulte de elektoj, faritaj dum tiu kunveno: Hodakowski, Alfus, Kutscher, dro Dreher, inĝ. Tor, f-ino Wajnsberg.

Revizia Komisiono konsistas nun el Dro Rosenstock (eks-Napoleono de la Oka), inĝ. Kostecki kaj Wiesenberger.

Raporton pri Pola Esperanto-Instituto, bone progresanta, faris la laborema Kutscher, sur kies ne tro larĝaj ŝultroj pezas nun ne nur la tuta administrado de „Pola Esperantisto", sed ankaŭ tiu de la Instituto. Kun ĉiu nova abonanto por „Pola Esperantisto" aŭ nova ekzamenito ĉe Instituto pleniĝas per ĝojo la koro de s-ro Kutscher kaj li videble kreskas supren al ĉielo. Se niaj gesamideanoj ĉiuj bonvolus apogi nian organon „Pola Esperantisto", fervorulo Kutscher verŝajne jam atingus la altecon de la ĝenerala sekretario Hodakowski (1 m. 85 cm.! Korekto pasintnumera danke notita.).

Ĝuste pri tiu neceso pligrandigi la abonantaron (per abonmendoj!) energie pledis en sia parolado s-ino Cense. Esperinde ŝia voko atingos ĉies orelojn kaj poŝojn.

El la raporto pri la Instituto evidentiĝis i. a. ke certa nobla anonimulo malavare subtenas la Instituton per regulaj monsubtenoj kaj donacado de lernolibroj.

Prof. Bujvid kontentigis la scivolemon de la surprizitaj membroj de la kunveno, malkaŝante, ke tiu imitindulo estas nia fidelulo Tichawski el Katowice.

Oni ovacias la malanonimigitan, kiu iom kolerete firmavoĉe deklaras, ke li preferus resti ankaŭ pluen nekonata tiurilate.

Aro da aliaj gravaj demandoj, kiel propagando en skoltaj rondoj, estis ankaŭ pritraktitaj dum tiu vigla kunveno.

Neforgesebla restos en memoro de ĉiuj la momento, kiam la temperamentplena (gardu vin, junulinoj!) Lejzerović, komencinte paroli pri la egaj meritoj de nia longjara gvidanto prof. Bujvid, ekflamiĝis kaj kun vera subita inspiro kortuŝe kaj arde parolis pri lia oferplena senlaca agado, montrante prof. Bujvid kiel veran ekzemplon de sindona samideaneco.

La efiko de tiu parolado estis senmezure profunda. La tuta ĉeestantaro leviĝis, brue aklamante kaj vivuante honore al la grizbarba, sed junkora modela adepto de Zamenhofaj lingvo kaj ideo. Kaj antaŭ la entuziasmoplena gesamideanaro pollanda du homoj konvulsie larmkisis sin en fruneca ĉirkaŭpreno: mondkonata scienculo kun modesta junulo.

**Kola Ayaji, rompita lampo kaj koncerto.**

Malgraŭ sia severa averto: „Malpli da amuzo, pli da laboro", la Kongresa Komitato zorgis ankaŭ pri la distrado de la kongresanoj.

Unu el la plej allogaj punktoj de la „nelabora" parto estis la anoncita prelego de nia nigra samideano Kola Ayaji pri vivo kaj moroj en Afriko. Tiu prelego estis okazonta kun lumbildoj, post kio devis sekvi koncerto.

La prelego altiris sufiĉe multe da gekongresanoj, kiuj kun iom acida mieno laŭ postulo de la deĵoranta komitatanino pagis por la eniro. Cetere ili jam alkutimiĝis al tiu „novorganiza" sistemo, aplikata unuafoje en Lublin, laŭ kiu por ĉio oni devis pagi aparte (eĉ por insigno kaj... ankaŭ por la fervojrabatilo!).

Oni tamen atendis sufiĉe longe. La kaŭzo klariĝis baldaŭ: la lampo en la projekcia aparato de s-ro Ayaji rompiĝis (jam en Lublin, ne en Afriko) kaj tial Ayaji kun sia amiko Fethke kuris en la urbon esplori eblecon de akiro de nova lampo.

La esplorado havis negativan sekvon kaj tial oni anoncis al la publiko, ke la prelego ne povas okazi, ĉar sen la lumbildoj ĝi ne estus interesa. Kvankam plejmulto opiniis, ke ankaŭ sen lumbildoj povas esti interesa prelego, precipe pri Afriko, des pli el la buŝo de negre-nigra samideano, okazis nur la koncerto, kiu konsistis el negraj kantoj, plenumataj de Kola Ayaji kun propra tamburakompano.

La ĉeestantaro restis tre kontenta pro la koncerto kaj nur vive bedaŭris la lampan akcidenton. Esperinde, kiam nun nia samideano Ayaji komencos sian prelegvojaĝon tra Polujo, s-ro Fethke zorgos pri la lampo ne malpli ol pri s-ro Ayaji kaj ni povos en ĉiuj lokoj, kie troviĝas Esperantaj grupoj, aŭdi liajn sendube interesajn kaj allogajn prelegojn.

Alia prelego ankaŭ tre interesa estis tiu de f-ino Wajnsberg pri Maroko kiun ŝi antaŭ nelonge vizitis.

**„Senmisa" balvespero.**

Alia „najlo" de la distroprogramo estis la anoncita balvespero kun revuoprogramo kaj kun okazonta elekto de „Miss Esperanto".

Je 10-a horo vespere, kiam laŭprograme la balo devis komenciĝi, kompreneble preskaŭ neniu estis en la bela salono de la „Muzika Societo". Ne nur la lacegaj (vidu la devizon: ...„pli da laboro!") kongresanoj, sed ankaŭ la nelacigeblaj kaj nelaciĝantaj gearanĝantoj plejparte ankoraŭ ne venis. Estas ja kutimo en nia lando ĉion komenci malfrue, speciale la balojn.

Tial la unuaj venintoj eĉ ne havis la eblecon montri al iu ajn siajn enirbiletojn. Sed poste, kiam iom da publiko jam estis en la salono, super ili ekaperis en la aero subite la kapo de altkreska Pruski (lian altecon mi jam ne riskas difini, por ke ne aperu nova ĝustigo) kaj li ordonis al la publiko... forlasi la salonon, kio ebligos la kontrolon de enirkartoj. Kiel hebreoj el Egipto, tiel la gekongresanoj elmigris el la salono kaj poste tuj reeniris tra la sama pordo, montrante siajn enirkartojn. Ordo ja devas esti. Fiat justitia, et pereat mundus!

Poste ĉio jam okazis laŭorde, laŭprograme. Estis bona muziko, interesaj samideaninoj, bonkora Berman kiel ĉiam regalis ĉiujn per ĉokolado. la paroj valsis, tangis kaj... (rigardu miajn raportojn pri antaŭaj kongresoj! Mi devas iom mallongigi mian rakontadon, ĉar la ĉefredaktoro jam fariĝas maltrankvila!)

Venis ankaŭ la atendata revuprogramo. Ni prenis niajn seĝojn, faris el ili pli malpli regulajn vicojn kaj eksidis antaŭ la scenejo, improvizita sur la podio por la orkestro. La lampoj en la salono estingiĝis, ĉiujn ĉirkaŭprenis, ne, mi „psikanalize" eraris, pli ĝuste estus: ĉiujn ekkaptis ia agrabla milde-reve-senzorge-poeziplena sento kaj kun retenita spiro ni atendis la komencon de la programo. Mia najbarino, ne malpli ekpoeziigita ol aliaj, aŭ eble eĉ pli ol ĉiuj, apogis sian kapeton (pro laceco) sur mia ŝultro kaj flustris reveme: „Esperantaj kongresoj estas belaj, belegaj! Mi rememoras nunmomente la Parizan kongreson, parizajn bulvardojn, Bulonjan arbareton, kaj belegan junulon, unu, du, tri,...".

Sed la programo komenciĝis kaj mia najbarino jam tute senvorte daŭrigis per la lipoj la kalkuladon.

Sur la podio aperis s-ro Filip Kurjański, eksgvidanto de Esperanta revuteatro en Białystok „La verda muelejo", nun transloĝiginta (s-ro Filipo, ne la teatro!) al la ĉefurbo Varsovio. Li anoncadis ĉiun numeron, prezentante al la publiko la geartistojn. Kelkaj liaj spritaĵoj pliviglig̑is la humorojn kaj estis aplaŭditaj, kelkaj aliaj spritaĵoj, kiujn li eldiris, pro mallumo ne estis rimarkitaj de la ĉeestantaro.

La geartistoj f-ino Rozo Porozowska kaj s-ro Boriso Halpern, ambaŭ el Białystok, kiel ankaŭ f-ino A. Szrencka el Varsovio plaĉe prezentis kantojn kaj fragmenton el la opereto de Hiller „Ho, tiuj fremduloj!". Ili estis brue aplaŭditaj.

Mi tiom ekinteresiĝis pri la programo, ke mi tute forgesis pri mia ĉarma najbarino. Kiam mi rekonsciiĝis, mi rimarkis, ke ŝia kapeto jam ripozis sur la ŝultro de ŝia aliflanka najbaro kaj mi klare aŭdis la flustradon: „Tricent sepdek kvin, ses, sep" ktp.

Kiam la programo finiĝis, denove ekkomenciĝis la dancado.

Nur la lasta punkto de la programo restis neefektivigita. Oni ne elektis la promesitan „Miss Esperanto". Kial? Mi ne scias. Sed mi s u p o z a s, ke la Esperantistoj preferis resti fidelaj kaj ne deziris „Misesperanton". Ili restis ĉe Esperanto.

Grize jam estis en la stratoj de Lublin, sed la verda anaro ankoraŭ fervore am-uzis, ripetante laŭ Hiller:

„Dancu, sen fino,<br>
Samideanino,<br>
Ho, dancu nur!

**Alia dancado.**

Malpli da plezuro! — diris ja la severaj lublinanoj. Kaj tial ili regalis nin ankoraŭ per dancado la sekvantan vesperon en „Oaza".

Tie ankaŭ fulmrapide pasis la tempo inter ĝoja babilado ĉ e tabletoj, dancado i n t e r tabletoj kaj deklamado s u r tableto (de f-ino Irena Szczepańska).

Ia ne-Esperantista gasto, sidanta antaŭ baterio da boteloj, obstina kontraŭulo de nia movado (sur la planko) kortuŝiĝis pro nia laboremo kaj fervoro. Li tial nur milde admonkriis:

— **Masonoj, foriru dormi!**

Ĉu ni, geamikoj, obeos lin kaj dormos ĝis sekvonta Kongreso?

**J. ŜAPIRO.**

PROF. DR. JÓZEF REISS (Kraków).

# LA BELECO DE LA POLA MUZIKO

En la pola popolmuziko respeguliĝas la animo de la nacio. En la melodioj de l' popolkanto estas ensorĉigita la pola nacia spirito. Antaŭ nelonge ankoraŭ la pola popolmuziko ravis la tutan Europon. Konfirmas tion fama germana estetikulo, Daniel Schubart en la verko, eldonita en 1806 sub tit. „Ideoj al unu estetiko de la muzikarto" (Ideen zu einer Aesthetik der Tonkunst) kaj laŭdegas la neesprimeblan ĉarmon de l' pola popolmelodio. Jen liaj vortoj:

„La popolmelodioj de la pola nacio estas tiel majestaj kaj samtempe tiel ĉarmaj, ke ili estas imitataj de la tuta Eŭropo. La polaj kantoj kaj dancoj apartenas al la plej belaj kaj plej allogaj el kantoj de ĉiuj nacioj".

Kaj vere unu el la plej grandaj trezoroj de la pola muziko estas la danco. En XVI j. c. estis la pola danco „chorea polonica" en Germanujo nomita „Polnisch Dantz" la objekto de la admiro en la tuta Eŭropo. Ĉie oni ĝin imitis. La germanaj kaj francaj komponistoj klopodis en siaj dancoj kapti tiun nemezureblan sonon, kiu distingis niajn dancojn.

Kaj polonezo! en XVIII jc. ne ekzistis pli fama komponisto, kiu ne skribus polonezojn: G. T. Telemann, J. S. Bach, Speronles, Wilh. Fried. Bach, J. Ph. Ramenau kaj multaj aliaj, ĝis fine aperis la kreinto de la polonezo kiel artformo: Princo Miĥaelo Kleofaso Oginski, kiu atingis pere de siaj polonezoj legendan gloron. En nuna jaro pasas ĝuste 100 jaroj de lia morto.

Per kio ravis polonezo la fremdulojn? Nepre, per viva ritmo kaj melodio eleganta, nobla kaj spiritplena. La spirito de la polaj dancoj donis inspiron al F. Chopin por liaj geniaj muzikpoemoj. Liaj dancoj estas la plej perfekta esprimo de la poleco: mazurkoj estas kvazaŭ eĥo de la pola kamparo, kaj polonezoj estas apoteozo de la heroa pasinteco de la pola nacio. Polplena estas ankaŭ la muziko de Stanisław Moniuszko, genia kantisto kaj kreinto de la pola opero. Apud Chopin estas Moniuszko unu el plej grandaj korifeoj de la pola muziko. Unu el plej severaj germanaj kritikistoj esprimiĝis pri ĉefa opero de Moniuszko „Halka" en vortoj de la plej granda entuziasmo kaj vidis en ĝi la respeguliĝon de la pola muziko. Oni nomis Polojn „la popolo de la violonistoj". Kaj prave! Polujo estas patrujo de la moderna violonludo. En XVI jc. estis fama en Eŭropo „pola violono" (Pohlische Geigen), kiel oni ĝin nomis en Germanujo.

Malfacile estis ludi violonon, ĉar ĝi ne havis „sojlojn" (Bünde) difinantaj la poziciojn de la tutaj kaj duontonoj.

Polaj violonkonstruistoj kiel: Groblicz, Dobruelli, Dankvart kaj aliaj atingis tiel grandan gloron, kiel italaj majstroj el Brescio kaj Cremona. La violonludo havas en Polujo du plej grandajn virtuozojn: Karol Lipiński, kiu rivalizis kun Paganini kaj Henriko Wieniawski, kies famaj komponcioj kiel: Kujawiak, Oberek, Polonez H dur, Legenda spiras per sentplena melodio de la pola muziko.

El la spirito de tiu ĉi muziko elsorĉis la mondon de la ĉarma beleco Władysław Żeleński kaj Mieczysław Karłowicz, majstro de la simfoniaj poemoj, malĝoj- kaj melankoliplenaj, kiu mortis per tragedia morto, sur-

ŝutita de lavango en Tatroj, kaj Karol Szymanowski, plej honorinda reprezentanto de la nuna pola muziko.

El la pola lingvo esperantigis
N. Bertkanka.

TADEUSZ BILIŃSKI.

# „NOMTAGA DONACO".

Warski estis en granda embaraso... Morgaŭ okazos la nomtago de lia „onklineto", de kiu li povis — ne sen ia bazo — esperi, ke ŝi ne forgesos pri li en sia „lasta volo", kaj li absolute ne povis sin decidi je la elekto de la konvena donaco.

Li iris al la granda magazeno, kie oni povas ricevi ĉion de la kudrilo ĝis... la ĉerko.

— Mi volus ian donacon por sufiĉe maljuna sinjorino, sed ion eksterordinaran, absolute ne ŝablonan — nome ĝi devas esti la donaco por la riĉa onklino...

La ĉerfkomercisto kompreninte ridetis:

— Mi jam komprenas. Kaj kiom da jaretoj via estimata onklino kalkulas al si?

— 75... sed ŝi ankoraŭ estas tre energia, vigla kaj temperamentplena, kiel la dekoka fraŭlineto.

— Bonege!... do... eble papageton parolantan diversajn lingvojn?

— Ŝi jam ĝin havas... kaj krom tio akvarion kun oraj fiŝetoj, hejmigitan krokodilon, tri angorajn katojn, unu simietom, tri hundetojn kaj sepdek kardelojn...

— Do... eble radioaparaton?

— Ŝi jam havas ĝin... krome spinetou, citron, elektran fortepianon, saksofonon, segilon, megafonon kaj... jerihonan trompeton.

— Hm... eble... eble... ion el la beletristiko.. ekzemple... Bocaccion en leda orumita bindo?

— Kaj tion ankaŭ ŝi havas. same kiel Casanovan. Markizon de Sade... Ovidian „Arto de l' amo" ktp... mi ankoraŭfoje ripetas, ke mi devas havi por ŝi ion eksterordinaran....

— Nu... eble falditan vel-boaton, bonegan por „weekend"?

— Ho... Vi ne konas mian onklinon! Ŝi ankoraŭ bonege skiveturas... ŝi kondukas aŭton kaj aeroplanon, fi... la velboato estus po ŝi la tro ordinara donaco.

— Hm... la direktoro gratis sian senharajon... eble... eble punktroleron „aŭ" muskolfortigilon?

— Sinioro — ekkriis malesperigita Warski — kaj tion jam ŝi havas! Vi devas scii, ke mia onklino estas multobla sportulino. Ŝi ĵetas diskon — kiel Konopacka — ŝi skermas — kiel Latinik aŭ Jopek — ŝi ludas tenison — kiel Aŭssen. ŝi raidas. saltas. dancas. kiel ĉokolada Backer kaj nun ŝi lernas boksi.

La komercisto enprofundiĝis en pli longan meditadon. Mi havas, mi havas!... subite, ĝoje li ekkriis. — mi havas ion... prima... primissima...

— Nu... kion?

— Ĉambran krematorion. „Forbruligu vin mem".

Warski leviĝis rapide. sed poste li falis denove sur la seĝon.

— Ne... ne... ŝi povus ĝin opinii kiel ian arogantan aludon kaj tiamaniere mia heredaĵo perdiĝus. Ho... ve... kaj tion ankaŭ ne!...

— Sinjoro — febriĝis la komercisto — ne pensu, ke nia firmo ne trovis ian rimedon por fari allogа kaj eĉ kiel eble atrakcia tiun makabran ilon, rememorigantan al ni neeviteble atendantan nin finon. Dank' al speciala konstrukcio kaj ankaŭ dank' al la priskribo. kiu estas aldonita al ĉiu aparato: Bonvolu nur aŭdi!

„Heima krematorio". „Forbruligu vin mem" — Epoka eltrovaĵo. — La lasta vivĝojo — dolĉigilo de la homaro.

„Post multaj provoj mi sukcesis konstrui aparaton facile transporteblan kaj munteblan. kiu. almetita al gasinstalacio, liberiĝas ĉiun progreseman homon de la zorgo pri la lastaj momentoj.

De nun oni jam ne devas pensi kun teruro pri la putro kaj la malbela tombo. nek pri tio. ke nia lasta vojaĝo estas spektaklo por la amaso da indiferentaj. senpensaj gapuloj. De nun oni povos eviti tiujn tedajn ekstremaĵojn kaj kiam la lasta horo ekSonas ĉiu povas heime subiĝi al la efiko de la „gaiiga gaso", kiu enprofundiĝos lin en la ĝuigan. eternan sonĝon. antaŭ ol li. forbruliĝinte. aliformiĝos en cindron, el kiu la ekliberigita spirito forflugos en la ekstermondon".

„Modernaj, progresemaj homoj, liberaj de tradiciaj antaŭjuĝoj, aĉetu membruligilon por vi mem kaj viaj geproksimuloj".

La ĉefkomercisto silentis unu momenton:

— Nu... kion vi opinias? Ĉu ne la eksterordinara eltrovaĵo?

Warski ankoraŭ hezitis.

— Mi dubas... ĉu „ĝi" allogos ŝin...?!

— Sinjoro... mi petas pardonon... sed, se mi povas laŭ via priskribo konkludi — via estimata onklineto estas moderna kaj progresema virino ĉu ne?

— Jes... bedaŭrinde...

— Do... sekve... mi dubas nek unumomente, ke nia epoka eltrovaĵo devas plaĉi al ŝi...

— Hm... ekmurmuris necerte Warski — Ĉiukaze tia nomtaga donaco estas la plej originala... ĉu ne?

— Sendube...

— Kaj ĉar ĉiu virino serĉas ian novaĵon... do tio estas certa, ke via onklineto tuj elprovos tiun aparaton... kredu.... mi vin petas, ke vi havu fidon al mi kaj aĉetu tiun belegan krematorion. Ĝi kostas nur bagatelon... 450 zlotojn... Permesu kompleze, ke mi demonstru al vi „membruligilon".

La ĉefkomercisto kondukis sinjoron Warski al alia apartaĵo, kie staris membruligiloj, kiuj similis al la granda fera ŝranko kun malgrandaj fenestretoj.

— Jen ili... kaj nun vi konvinkiĝos, ke niaj aparatoj funkcias senriproĉe. Ĉe tiuj vortoj li kaptis je la oreloj dikan kuniklon, kiu pacience ĉirkaŭmordis la folion de brasiko kaj enŝovis ĝin en la krematorion.

— Rigardu... Sinjoro... kiel la kuniklo heliĝis — mi diris al vi, ke tio estas grandioza morto.

„Gaja" kuniklo saltis ridige, kvazaŭ ĝi dancus fokstroton — fine ĝi ekstaris sur malantaŭaj piedoj kaj per la antaŭaj ĝi ŝajnis aplaŭdi je la ĝojo kaj aprobo. „Vidu Sinjoro... kun kia aprobo ĝi estas por nia membruligilo... Kaj nun rigardu — la kuniklo malrapide enfalis en eternan dormon, konservinte ĉiam la saman feliĉegan mienon... jes... nun okazos membruligado... do mi ekpremas tiun ĉi butonon kaj en gastuboj ekbrulas la flamoj... la mortinta sinjoro kuniklo komencas rostiĝi... ĝi disfalos kaj post kelkaj minutoj ĝi cindriĝos... Jen unika higiena, pura, hominda moderna morto... Mi petas vin, Sinjoro... bonvolu aĉeti tiun aparaton... Vi ne bedaŭros... Do... kia estas la adreso de via estimata onklino?

— — — — — — — — — — — — — —

Kaj la „membruligilo" estis forsendita laŭ la donita adreso kun nomtagaj bondeziroj de Warski sur la vizitkarto.

Dum kelkaj tagoj Warski ne kuraĝis sin montri proksime de la onklineta loĝejo. Gravajn konsciencriproĉojn li havis kaj la heredaĵo post la onklino ŝajnis al li duba. Multaj semajnoj forpasis. Kaj Warski ricevis nenian... dankleteron. Tio pli maltrankviligis lin kaj li skrupule evitadis ĉiun renkonton kun sia onklineto.

Fine... li ricevis... leteron.

Kiam li disŝiris la koverton, atako de furiozeco ekkaptis lin kaj rapide li kuris al la magazeno.

La ĉefvendisto akceptis lin kun videbla konfuzo.

— Sinjoro, sinjoro, mia onklino...

Ŝi sendis al ni dankleteron.

— Kion... kion?

— Dankon pro la... ĉambra ŝvitbano...

— Pro kio?

— Kaŭze de nia malatento... ni bedaŭrinde forgesis aliĝi prospekton al la aparato kaj... via estimata onklineto ĉiutage uzas nian krematorion, kiel vaporbanon kaj nomas ĝin en sia letero „la fonton de la juniĝo", kiu estas pli efika ol... Woronoff.

— Do... ŝi tute ne forbruliĝis"?

— Ne — respondis la komercisto. — Mi mem ne komprenas, kiamaniere tio okazis, sed la onklineto opinias, ke ĉiutage ŝi fariĝas pli sana, pli juna kaj freŝa... Tiel almenaŭ ŝi skribas.

— Diabloj forprenu vian „krematorion rejunigantan", kiam oni jam forprenis mian heredaĵon.

— Mi petas pardonon, estimata sinjoro — la komercisto mildigis furiozan Warski — bonvolu ne forgesi, ke vi faris al la onklino agrablan donacon, kion ŝi certe ne forgesos al vi — kvankam muntempe tio daŭros iomete... pli longe...

— Mi pensas... la maljunulino sendube vivos 150 jarojn.

— Poveble... sed tio ankaŭ ne estas ekskluzivita, ke ŝi pro la varmego subiĝos al... apopleksio...

— Tio estas nun al mi tute indiferenta. Ĉu vi aŭdas... tute indiferenta. Vi enkapuĉiĝita Voronoffo... Prenu ĝin kaj legu...

Warski furioze donis al la vendisto la forĉifitan pecon da papero. — Sur la papero staris sekvantaj vortoj.

„ Kara Tadeo...

Mi sciigas vin, ke mia edziĝo ku S-ro Viktoro Pugno — industriisto de la bokso — okazis la 5-an de Majo en la preĝejo de Bonifratoj.

Via vin amanta onklineto...

P. S. gratulojn mi ne akceptas".

Antaŭ ol la vendisto povis sin orienti, Warski brutale elŝiris al li la leteron kaj furioze elkuris el la magazeno.

Fino.

**IRENA SZCZEPAŃSKA.**

# MODERNA CINDRULINO.

Princo karnavalo freneziĝis. Lia brilanta vesto brodita per cent lumoj kaj koloroj, ravadis la tutan mondon. Lia tentanta voĉo, kiel kanto de legenda Loreley, allogadis la erarintajn vivmigrulojn sur senlima maro de l' vivo.

Nur en griza, malhela monaĥinejo neniu preskaŭ sciis, ke la mondo travivas nuntempe la plej ĉarmajn revojn kaj songojn.

Silentemaj monaĥinoj paŝadis tra senfine longaj koridoroj.

Ili ŝajnis esti la griza rozario de l' mezepoka preĝo.

Oni povis pensi, ke la vivo kun sia lerteco kaj ĉarmo estas tute forpelita de gravaj muroj. Sed estis tute kontraŭe.

En la granda salonego de l' mastrumada seminario por junaj knabinoj el riĉaj domoj, regis tute alia ekzisto, al kiu ĉiu ajn nun sopiris.

Speciale la dekoka Tanjo, fraŭlino kun okuloj kiel du lampiroj, kun haroj kiel sunaj serpentoj, kaj koro soifanta amon kaj poezion, preskaŭ fizike suferis!

— Karnavalo! — ŝi elvokis reveme kaj sopireme. — Mi donus mian koron kaj animon, se mi unufoje povus danci hodiaŭ nokte!

Respondis nur ironiaj ridetoj de kamaradinoj kaj zumo de nudaj arboj en ĝardeno, kovritaj de la neĝo.

En tiu sekundo granda, brilanta birdo tranĉis la aeron. Ĉiuj fraŭlinoj, kiel aro da kolomboj alkuris fenestron...

— Aeroplano! fabela birdo de modernaj deziroj! Prenu nin kun vi al pli bela kaj gaja vivo! — ekkriis ĥore ĉiuj knabinoj.

Sed la mistera birdo malaperis. Restis nur safira ĉielo elŝovanta siajn malhelajn fingrojn tra la kadroj de l' fenestro.

Tanjo eniris sole ĝardenon, por refreŝiĝi iomete sian varman de l' revoj kapon. Estis malreale kaj mistere...

Kiam ŝi alproksimiĝis al la skulptita laŭbo, iu voĉo vekis ŝin el strangaj pensoj.

— Hallo! Tanjo! Venu rapide!

Tanjo ege mirigita ekkonis la voĉon de sia plej bona amikino.

Sed Injo ja estis delonge en Varsovio. Ŝi unumatene forkuris el la monaĥinejo, eĉ ne fininte sian edukadon! Kiamaniere ŝi povis troviĝi nun en la monaĥineja ĝardeno?

— Tanjo mia plej kara! Demandu nenion, sed faru ĉion, kion mi ordonas. Prenu tuj vian pelton kaj ĉapelon, ĉar en aero estas granda frosto!

— Kion vi babilaĉas kara Injo? — ekkriis Tanjo.

— Mi ne havas tempon por klarigi ĉion. Mi venis al vi en aeroplano, kun ĝia posedanto, kaj ni forkaptas vin, por unu karnavala nokto. Venu tuj, ĉar monaĥinoj povus rimarki min, kaj nia bela aventuro estus malhelpita!

La feliĉo estas la paradiza birdo. Oni ne povas tro longe ĝin pririgardi, ĉar ĝiaj ĉielarkaj flugiloj perdas la koloron.

Kiam la du amikinoj troviĝis sur la herbejo de malgranda vilaĝo, ili komencis danci kaj salti de l' ravego. Ĉar la libereco estas la plej emociiga ĉampano, kiu turnas eĉ plej fortan kapon.

La grincoj de l' arĝenta aeroplano fariĝis por oreloj de ravita fraŭlino la fantazia muziko, kiu ludas por dancantaj feinoj.

En aeroplano jam atendis terura homo, simila al fabela sorĉisto. Nur tre grandaj okulvitroj rigardis helaj okuloj, tiel sunaj, ke vintra vespero ŝanĝiĝis je printempa mateno.

Tanjo volis krii kaj kanti furiozan himnon de l' ĝojo, sed neniu estus aŭskultinta, ĉar fluganta jam motoro faris grandegan bruon. Kiel la apokalipsaj bestoj, ridantaj de l' feliĉo de unu modesta fraŭlino.

Post duona horo (por Tanjo post tri sekundoj) ili tri jam estis en ĉefurbo. Terura sorĉisto el aeroplano ŝanĝiĝis je aŭtomobilgvidanto. Per gesto plena de ĝentileco li invitis al sia bela maŝino la du junajn fraŭlinojn.

Kiam fine Tanjo troviĝis en la ĉambro de Injo, ŝi ekkriis surprizita. Ĉi tie jam atendis belega bala vestaĵo, teksita el roza nebulo kaj ornamita per la floroj de l' pomujo. Malgrandaj pantofletoj el milionoj da briliantoj ridetis amike al revanta Tanjo. Bruna, dika robo defalis de l' roza, silka Tanja korpo. Kiel elfalas la ŝelo el la delikataj migdaloj...

Silka araneaĵo ĉirkaŭprenis ŝin.

— Mi volis hodiaŭ ŝanĝiĝi je bona sorĉistino el „Mil kaj unu noktoj", — ridetis kontenta Injo. — Nur mankas la fabela princo! Serĉu lin kara Tanjo, por ke vi ne devu reveni al via griza monaĥinejo, gardata de drakoj!!

Ĉiu ridetis en tiu minuto. Ora mimozo en kristala vazo. Multkoloraj rozoj, velkantaj senvive en la ornamo de tapeto. Eĉ pupetoj sidantaj sur la kanapo kaj skribtablo.

Tanjo en briliantaj pantofletoj, kaŝita en granda zibela pelto, paŝis delikate sur la ruĝaj tapiŝoj. Ĉie brilis lumoj kaj susuris ekzotaj palmoj.

Ĉiu ankoraŭ iranta balon, rigardis scivole la belan fraŭlinon.

La unua takto de valso, dolĉa viena valso, kaptis Tanjon en siajn brakojn, kaj jetis ŝin en abismon de l' ĝojo kaj ravo.

Kial la blindaj homoj diras, ke ne ekzistas la feliĉo? Ĉu ĝi ne flugis al Tanjo el ĉiu melodio, el ĉiu brilo de l' lumo, el ĉiu rigardo de l' viroj, el ĉiu banala sed ĉarmplena komplimento?

Fraŭlina, papilia vivo, mortanta dum la griza mateno!

Sed Tennyson granda filozofo kaj poeto diris, ke estas pli bone havi la amon kaj perdi ĝin, anstataŭ neniam ĝin posedi. Same estas kun la feliĉo...

Fabela princo aperis. Li nek havis veluran ruĝan mantelon, nek oran kronon. Li havis nur malgrandan aeroplanon, kiu nun ripozis en aeroplanejo.

— Ĉu vi scias fraŭlino Tanjo, ke la plej belaj estas hiacintoj kiuj dum la tuta vintro dormas en malhela kelo? Vi estas tiu roza hiacinto, kiu dum la hodiaŭa nokto ekfloris. Vi jam ne povas reveni al tiu kelo. Vi jam bezonas sunon kaj varmon!

— Vi estas tute moderna homo, kara inĝeniero! Kial vi do povas esti samtempe poeto? Lasu tion al via aveto, kiu volis „turni la kapon" al iu dormanta princino — ridis Tanjo, sed la koro batadis pli forte ol la tapado de l' fortepiano.

— Ridu kara Tanjo je mi! ridu! La saĝeco de la nacioj estas ridi, senĉese kaj plenkore!

La blua mateno en la ora robo de l' suno jam dancis ekster la fenestroj. Oni mallumigis ĉiujn lampojn kaj nur kelkaj paroj dancis senĉese en blua, matena agordo. Tanjo en la brakoj de sia princo naĝis kaj naĝis senfine. Ŝi sentis, ke kun la fino de valso venos la fino de feliĉo.

— Fraŭlino Tanjo! — ridis ŝia dancanto — en ĉiu fabelo malbona sorĉistino donas por diveni al sia viktimo tri enigmojn. Do aŭskultu ĉarma knabineto kaj respondu. Post tio ŝi oferos al vi ĉiujn terajn trezorojn kaj amon! Do atentu, atentu! Grava demando! Respondu forte, kuraĝe, kaj elegante!:

— Ĉu la fiŝeto povas vivi sen akvo?

— Ne! — respondis ridante Tanjo.

— Ĉu floreto povas vivi sen la suno?

— Tute ne!

— Kaj ĉu mi povas vivi sen vi?

— Absolute neeble! — ekkriis la kortuŝita knabino.

En tiu minuto varmaj lipoj de fabela princo alproksimiĝis al nekisata antaŭe fraŭlina buŝo. Jam du brakoj kiel serpentoj ĉirkaŭbrakis ŝin...

En tiu dolĉa sekundo Tanjo ekvekiĝis...

La sonorilo sonis kruele kaj griza monaĥino tuŝadis la brakon de Tanjo. Mallonga estas la vivo de l' sonĝoj!

# KOMUNIKO DE P. E. D.

1) Dum la okazintaj du kunsidoj de Ekzekutiva Komitato de PED. oni decidis jenan atribuon de funkcioj: Prez. s-o prof. Bujwid, vicpr. s-o dir. Tor, ĝen. sekret. s-o Hodakowski, sekr. s-o Kutscher, kasisto s-o Alfus, estraranoj s-o Dro Dreher kaj f-ino Weinsberg, revizia Komisiono: s-ro dir. Kostecki, dro Rosenstock kaj s-o Wiesenberger.

2). Kompletiĝo de Plena Komitato de P. E. D.

**Katowice:** Faruga Franciszek, Matejki 1.

**Lwów:** Inż. Zylbersztejn Jan, Małeckiego 3.
Zieliński Zbigniew, Kochanowskiego 26/I.

**Wilno:** Szyk Salomon, Zawalna 58.

3) Ekzekutiva Komitato de P. E. D. akceptis inviton de Varŝavaj Esp.-societoj por okaziĝi tie la VI-an Tutpollandan Kongreson en tagoj de 4—5 junio 1933.

4) Oni alvokas ĉiujn Esp.-societojn membriĝi al P. E. D. kaj aboni Polan Esperantiston kiel ĝian organon.

# POLLANDA KRONIKO.

**KATOWICE.** La Societo de Esperanto Amikoj aranĝis sabate, la 10-an decembro 1932 en la salonego de „Hospiz". sian Dro Zamenhof-Memorfeston kun riĉa programo. Tiun feston ĉeestis ĉirkaŭ 300 personoj.

La 15-an de septembro 1932 aranĝis la sama Societo Esperantokurson por komencantoj en la lernejo „Gospodarza", ul. Szkolna nro 5. Anoncis sin 40 gesinjoroj. Dum la trimonata daŭro de la kurso forestis pro malsanoj 5 personoj tial la kurson, kiu estis gvidata de samideano F. Faruga finis 35 gesinjoroj. Nova kurso por progresintoj okazos la 18-an de januaro 1933, kaj por komencantoj la 20-an de la sama monato je la 8-a horo vespere en la sama lernejo.

**KRAKÓW.** Dum la ĝenerala kunveno de Esperanto-Societo oni elektis jenan estraron: prezid. s-o prof. Bujwid, vicpr. s-o Zajączkowski kaj s-ino Neuberg, sekr. s-o Ortsman, kas. s-o Anhalt, mastrino s-ino M. Szczepańska, bibl. f-ino Szatan, estraranoj s-oj Kutscher kaj Lichtensztejn.

**WARSZAWA.** Akademia Esperatista Rondo (Leszno 8/37) regule gvidas du elementajn kaj unu perfektigan kursojn. Ĉiudimanĉe okazadas prelegoj. Ĝis nun parolis: s-ro E. Ritenberg pri la „Pariza Kongreso", kolektive pri „Impresoj el Lublin" d-ro L. Zamenhof — „teorio de heredado", m-ro A. Wundheiler — „Batalo kaj kooperado kiel faktoroj de socia disvolviĝo", L. Winer — „Literatura vespero" kaj s-ro Ch. Bronsztejn „Homaranismaj ideoj de Zamenhof". La 15-an de decembro estis organizita kune kun la aliaj societoj Zamenhofa Vespero. Partoprenis ĉ. 150 pers. La Rondo organizis Esp. Ekspozicion, moderne aranĝitan. Multaj gazetoj kaj P. A. T. aperigis komunikojn pri ĝi. Ankaŭ per radio oni disaŭdigis dum kelkaj tagoj pri la Ekspozicio. Bedaŭrinde, nur ĉ. 350 pers. vizitis ĝin. La Rondo presigis 250 afiŝojn, kiuj nun estas elpendigataj en diversaj publikaj lokoj. Kelkaj dancvesperoj okazis.

# AL NEKREDEMULOJ.

Iuj niaj legantoj ne volas kredi, ke la Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj vere donos por la kotizo ĉiujn anoncitajn librojn kaj ili diras la prezon nekredeble malalta. Tamen la Asocio estas fakto kaj la plano certe plenumota. Tial vi devas rapidi sendi vian aliĝon, por ke vi ne malfruu pagi la plej malaltan kotizon de sv. fr. 13.50 ankoraŭ antaŭ 1-a de februaro. Post tiu date la kotizo plialtiĝos per dudek procentoj. Se vi ne havas la sufiĉan monon pagi eĉ tiun sumon je unu fojo, relegu la prospekton kaj vi vidos ke la kotizo estas pagebla en ses partoj, sed por havi la plej favoran kotizon, vi tamen devas sendi vian aliĝon antaŭ 1-a de februaro kun la unua parto. Ne forgesu, ke krom la kotizo vi devas sendi la sendkostojn, ĉar nericevinte la sendkostojn, AELA ne sendas la librojn. Ankaŭ ne forgesu aldoni sufiĉan monon por bindo kaj eventuala rekomendita sendo. Por faciligi al vi la pagon, ni notas, ke 1.— svisa franko egalvaloras 1.75 zł.

Ne forgesu la devizon:
**Lasta dato de favora kotizo 1-a de februaro.**

# PROPAGANDA VOJAĜO DE SAMIDEANO KOLA AYAJI TRA POLUJO.

**Akademia Esperantista Rondo** (Warszawa, Leszno 8/37) komunikas, ke ĝi funkcias kiel Organiza Centro de la propagandaj vojaĝoj de la negra samideano Kola Ayaji tra la tuta Polujo. Ĉiuj esperantaj societoj, UEA-delegitoj, individuaj esperantistoj esperantistoj bonvolu tuj interrilati kun la Organiza Centro por aranĝi tiujn ĉi prelegojn laŭ tre favoraj kondiĉoi. Antaŭaj kondiĉoi estas nuligataj. Eluzu tiun ĉi unikan okazon de la plej bona kaj efika propagando!

# RECENZOJ.

**PRAHA,** Ĉefurbo de Ĉeĥoslovaka Respubliko. Malnova Centro de Eŭropo. Eldonis Ĉeĥoslovaka asocio esperantista sub aŭspicioj de Turisma servo de UEA. Presis Industria presejo en Praha.

Belege sur lukса papero eldonita gvidilo kun 6 bele faritaj fotografaĵoj. Tre imitinda kaj rekomendinda gvidilo.

**Amo per proverboj.** Unuakta komedio de **ARTHUR AZEVEDO** el la portugala lingvo tradukis A. Couto Fernandes, Prezidanto de Brazila Ligo Esp. Rio de Janeiro.

Nia tre respektata kaj amata samideano de la ligo esp. en Brazilo tradukis bone konatan verketon de populara kaj multproduktanta brazila teatroverkisto. Malmultekosta libreto (unu złoty) estas vere rekomendinda por esp. teatraj prezentadoj, tre facile lernebla kiel teatraĵo kaj bona praktikilo por la lingvo.

**Universala Esperanto Metodo de DRO BENSON,** enhavanta kompletan rektan lernolibron, ampleksan ilustritan legolibron, universalan multlingvan bildvortaron.

41 lingvoj, 11000 bildoj, 100 listoj de samspecaj vortoj, 2 plenpaĝaj tabeloj de la prononcado de la esperanto-alfabeto en 36 lingvoj, 5 plenpaĝaj tabeloj de la korelativoj en 36 lingvoj. Newark, New Jersey U. S. A.

Estas vera trezoro por ĉiu serioza lingvostudanto, kiu povas ellerni la lingvon esperanto en sia propra hejmo sen iu ajn instruisto. La lernanto nur legas la subskribojn sub la bildoj kaj tiuj mem kondukas lin tra la tuto de la lingvo.

La ideojn por verki la frazojn li ĉerpas el la diktografo troviĝanta je la fino de la leciono. Ĉiu bildeto sugestas pretan ideon por fari la frazon.

### SCIENCA ESPERANTISTA MOVADO.

Aperis 29 n-ro de **Bulteno de Internacia Scienca As. Esp.** (I. S. A. E.), kies enhavo estas riĉa kaj tre instrua. Artikoloj pri kulturado de histoj, Difrakto de elektronoj, Nebrulebligado estas valoraj pruvoj de la nova vigla agado de la ISAE.

Sed por daŭrigi sciencan agadon estas necesa subteno de scienculoj el nia lando, kiuj nepre devas enskribiĝi ĉe S-ro **Rousseau**, Sekretario - Kasisto, pagante pojare duonon de dolaro.

Adreso: **2 rue Alfred de Vigny, Becon les Bruyeres, Seine, France.**

### Korespondado.

**S-o Charles G. Stuart - Menteth** korespondas kun komencantoj kaj perfektuloj. **31 Upper Bedford Place, London W. C. 1.**

La 8-an de februaro je la 22 h. 40 m. okazos el Warszawa kaj Kraków esp. radiprelego de s-o Hodakowski s. t. „La pola haveno Gdynia kaj Pomeranio".

PRENUMERATA: rocznie zł. 8.—, półrocznie zł. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. (przy przesyłce najmniej 5 egz. pod jednym adresem) prenumerata roczna zł. 6.— Zagranicą: 1 dol. Numer pojedynczy zł. 0.70.

ABONO: jare zł. 8.—, duonjare zł. 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj (ĉe sendo de minimume 5 ekz. al unu adreso) jarabono zł. 6.— Eksterlande 1 dolar. Aparta numero zł. 0.70.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł. 30.— 1/4 strony zł. 15.— 1/8 strony zł. 10.— Korespondencja: małe ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—

ANONCOJ. 1/2 paĝo zł. 30.— 1/4 paĝo zł. 15.— 1/8 paĝo zł. 10.— Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.—

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKOW, LUBICZ 34. KONTO P. K. O. NR. 406.660

Redaktor odpowiedzialny Juljusz Kriss.

Drukarnia L. Gronusia i Ski, Kraków, ul. Stolarska 6.